

Babilada rondo

... okazos je la 19-a, vendrede ...

la 26-an de junio

Rosario Scopelliti invitos vin
ĉe ch. Vallombreuse 14, Lausanne
021 648 76 44 / 079 415 65 02



Ne forgesu aliĝi ĉe:

<http://doodle.com/8dk45bk>
b8brdf2nd#



GRAVA INFORMO

*Inter la 26-a de oktobro kaj
la 7-a de novembro, LES
okazigos ekspozicion pri
esperanto en "Le Forum",
placo La Palud – Laŭzano*

Proverbo

*Ofte ĉapo de kampulo kovras
kapon de saĝulo.*

Por rideti

Oni diris al la vidvino de la
marŝalo Bouffers, post lia
morto : « La marŝalo multe
mankos al vi... »

« Eble. Sed almenaŭ mi scios,
kie li pasigas siajn noktojn »,
ŝi respondis.



Bazaro en Laŭzano

<http://doodle.com/fbzxwam>
eyqwivvhz#

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte
Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin *
076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Informilo

junio 2015 - n° 6

Sabate, la 27-an de junio

Jara ekskurso

**Vizito de la muzeo Baud
en L'Auberson**

Vidu detalojn malantaŭe

Somera paŭzo




Lunde la 7-an de septembro, avenue Dickens 6
ĉe la nova loko kunsida : "Espace Dickens"
Dietrich Weidmann, kunprezidanto de SES parolos
pri UEA, nia svisa asocio kaj la lokaj kluboj.

Dimanĉe la 4-an de oktobro, Espace Dickens
Kanta ateliero kaj koncerto publika de Manŭel Rovere

Lunde la 5-an de oktobro, Espace Dickens
Manŭel Rovere prelegos pri sia arto.

Laŭzana Esperanto - Societo

La jara ekskurso



Muzeo Baud
L'Auberson
Automatoj
Muzikskatoloj
Mekanikaj orkestretoj



Rendevuo en Laŭzano, norde de la aŭtoparkejo "Vélodrome" (apud la strato "Plaines-du-Loup) je 8h30. Ni grupos nin en minimo da aŭtomobiloj kaj veturos al la muzeo. Rendevuo en l'Auberson je 10h30. Poste ni tagmanĝos en restoracio en "Champ Pittet" (naturcentro) apud Yverdon. Reire, ni povos viziti la menhirojn de "Clendy" kaj ni haltos ie, laŭhumore. Reiro al Laŭzano ĉirkaŭ la 18-a.

Kiel anoncite, la tago kostos po CHF 30.- (muzeo kaj restoracio) pagotaj **antaŭ la 20-a de junio** al la poŝtĉekkonto 10-26785-8, kiel aliĝo.



Belajn kaj ĝojajn somerferiojn !



Novaĵoj

Kiel la Esperanta lingvo estas perceptata tra la ĵurnaloj.

Dankon al nia nova membro Marko, kiu prelegis brile kaj kompetente dum pasinta kunsido pri sia malfermita letero al diversaj ĵurnaloj. Respondante al artikolo, kiu pravigis la neceson uzi la anglan tra la mondo, li verkis longe kaj trafe leteron por altiri la atenton de la ĵurnalistoj pri nia lingvo, sed li ricevis nur unu respondon, esprimante neintereson... Pri tiu temo ni interkomunikis tre interese ĉirkaŭ la filozofio kaj la celo de Esperanto.

Kompreneble ni povas ankoraŭ unufoje konfirmi la utilecon konigi Esperanton tra la mondo. La ĉi-suba evento estos bela okazo por tiu celo !

Universala Kongreso 2015 en Lilio (Francio)

La venonta Kongreso esperigas grandan sukceson. Pli ol 2300 partoprenantoj aliĝis, venonte el 80 landoj, el kiuj 45 el Svislando, laŭ la listo de 20-a de majo. Ni povas pensi, ke ankoraŭ novaj partoprenantoj aliĝos ĝis la malfermo de la kongreso.

La kongreso okazos ekde la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. Certe oni renkontiĝos kun homoj el la tuta mondo. Estos momento de espero por marki la universalan solidarecon kaj fortigi la porpacajn movadojn inter la landoj.

Okazos prelegoj, kursoj, vizitoj, koncertoj, ktp. La partoprenantoj havos multe da eblecoj por elekti, kion ili deziras sekvi.